# *Alvenos al Havano la guberniestro de Nov-Jorko.*




Altrangaj gvidantoj de kelkaj grandaj entreprenoj kiel MasterdCard, Pfizer kaj la flugkompanio Jetblue voja?as ?i-lunde al Kubo kadre de komerca misio gvidata de la guberniestro de la ?tato Nov-Jorko, Andrew  Cuomo, informis la agentejo EFE.

La vizito, anoncita la pasintan januaron, estos la unua tiaspeca ekde kiam en decembro oni informis la intencon normaligi la rilatojn inter Washington kaj Havano.

La listo de partoprenantoj, anoncitaj de Cuomo, inluzivas anka? la respondeculojn  de edukaj institucioj kaj esplorcentroj, kaj anka? kelkajn politikajn reprezentantojn.

Inter la entreprenistoj ?eestas  la konsilanto delegita de JetBlue, Robert Hayes; la vicprezidanto de la kompanio MasterdCard, Walt M. Macnee, kaj la vicprezidantino de la farmacia entrepreno Pfizer, Freda Lewis-Hall.

Anka? alvenos reprezentantoj de aliaj kompanioj kiel la teknologia Infor, la farmacia Regeneron kaj la fabrikanto de jogurtoj Chobani; aldone, venos la respondeculoj de la internacia flughaveno de Plattsburgh, de la centro de esploroj de genomo de Nov-Jorko kaj de la ?tata universitato de Nov-Jorko.

Kune kun la privata sektoro, aliaj akompanantoj de Cuomo estos kelkaj el la ?efaj politikaj gvidantoj de la ?tato, interalie, la prezidanto de la asembleo, Carl Heastie.

Per komuniko, Cuomo esprimis ke “la reprezentantoj de la delegitaro de Nov-Jorko helpos certigi ke la ?tataj kompanioj estos en la unua linio en la momento kiam malfermi?os la pordoj al merkato kiu estis fermita por la entreprenoj de Usono dum pli ol 50 jaroj”.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/53232-alvenos-al-havano-la-guberniestro-de-nov-jorko

**Radio Habana Cuba**